Adam Krieger,

# Nun venis de la tago fin'

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Nun venis de la tago fin',
Ne lumas plu la Sun',
Dumtage laciginte sin
La homoj dormas nun.

Nur mi, mi ĉirkaŭiras sen
Ripozo tie ĉi,
Ne trovas mi la kaŭzon jen
De la melankoli'

Mizeron mian vidas vi,
Sed vi ne helpas min,
Vi steloj alte super mi,
Mortigos min je l' fin'.

Ekdormis vi jam, belulin',
Trankvile kuŝas vi.
Malkvietigas io min,
Ĉirkaŭe iras mi.

Ekaŭdu la sopiron vi,
Ho kara sinjorin'!
Ĝi diras, kiel fartas mi,
Ke vi flamigis min.

...

Adam Krieger,

# La tago iris jam de ni

*tradukita de Wolfram Diestel*

La tago iras jam de ni,
ne lumas plu la sun'.
Plorinte lacaj, ĉiuj ĉi
trankvile dormas nun.

.....
.....
.....
.....

.....
.....
.....
.....

En harmoni' vi dormas jam,
ho, kara belulin'.
Sed dum la nokt' sopira am'
iradi faras min.

Suspiro blovas, aŭdu ĝin,
tra la fenestr' al vi,
flustrante, ke vi ravis min,
kaj kiel fartas mi.

...

Se estas vi la origin'
De tiu ĉi sufer',
Mi petas, ke vi helpu min.
Aĥ, faru ĝin en ver'!

Ripozu dum la nokto nun,
Permesu vi al mi,
Se ree lumos hela Sun',
Ke estu mi ĉe vi.

*Traduko de la Germana poemo "Nun sich der Tag geendet hat" de* Adam Krieger *(∗1634-01-07 – †1666-06-30) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2005-04.*

*MR-436-1 / Arg-307-622 (2013-01-31 12:16:30)*

*La melodio estas aŭdebla en* `http://www.ingeb.org/spiritua/nunsichd.mid`.

.....
.....
.....
.....

Vi bonan nokton havu nun,
sufer' kaj ĝu' de mi!
Post la apero de la sun'
komune estu ni!

*Traduko de la Germana poemo "Nun sich der Tag geendet hat" de* Adam Krieger *(∗1634-01-07 – †1666-06-30) en Esperanton de* Wolfram Diestel *(Volframo Distel').*

*Arg-307-623 (2005-05-03 13:20:37)*